

Carl Riedel,

Aŭdu, paŝtistoj

tradukita de Albrecht Kronenberger

Aŭdu, paŝtisto,
mi diras al vi
Bonan sciigon
pri l' Filo de Di':
Enkarniĝinta,
ĵus naskiĝinta,
Ĉirkaŭvindita,
entrogigita.
Gloron al Li!

Vidu, homidoj,
la amon de Di'.
Malsupreniris
la Vorto por vi.
Kruce murdota,
entombigota,
Resurektonta,
ĉiel-ironta.
Gloron al Li!

...

Venu, kristanoj,
rapidu al Li,
Kiu bebiĝis
en stalo por vi.
Miru ĝojante,
kore kantante,
Genufleksante,
Lin adorante.
Gloron al Li!

*Traduko de la Germana poemo "Kommet, ihr Hirten" de CARL RIEDEL (*1827-10.05 – †1888-06-03) en Esperanton de ALBRECHT KRONENBERGER (*1940-01-21) en 1990.*

Arg-565-1142 (2010-09-20 11:11:28)

Tiu ĉi traduko troviĝas en la retejo <http://reocities.com/cigneto/thctxt/a/auxdupasx1.html>.